

ESPERO



I.K.U.E.

KATOLIKA

SEPTEMBRO 1953

No. 428

Jarkolekto 50

ESPERO KATOLIKA

Fondita de Pastro Emile Peltier, Tours (Francujo) en 1903.

Oficiala Organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.)
fondita de Pastro Richardson en 1910 en Parizo.

Prezidanto: sac. A. Beckers, Kanaalstraat 9, Overpelt-Fabriek (Belgujo)

Sekretario-kasisto: S-ro L.G.C. de Jong, Utrechtseweg 81, VLEUTEN
(Nederlando), Poŝtkonto 252792.

Redakcio: F-ino Truus Durenkamp, Kasperspad 91, DORDRECHT (Nederl.)




JARABONO: Ned. guld. 4,50 aŭ egalvaloro, pagebla al jenaj landaj

REPREZENTANTOJ:

Argentino:	S-ro W. Przewolka, Av. Forrest 1400-4 ^o , BUENOS AIRES; 22 pes.
Aŭstralio:	S-ro C. Hickey, P. O. Box 18, MOSMAN N. S. W. 10 sh.
Aŭstrujo:	S-ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19/9, WIEN III-40, p.k. 105.713 30 ŝil.
Belgujo:	S-ro A. de Bosschere, Regentieplaats 3 ST. NIKLAAS-WAAS, p.k. 74260 60 frs.
Brita Imperio:	S-ro N. W. Vigar, Defrene Road 43, SYDENHAM-LONDON SE 26, 7/10
Francujo:	F-ino J. Le Boedec, 18 rue Ernest Cresson, PARIS-14, p.k. 5815-56, 420 frs.
Germanujo:	S-ro H. P. Klein, Demrathkamp 28, ESSEN. p.k. 9040, 5,50 DM.
Hispanujo:	S-ro Angel Llobet, Plaza des Martires 20, MANRESA, 50 pes.
Irlando:	S-ro Lorcan O'hUiginn, Ardmore Farmhill Drive, Roebuck, DUBLIN, 7/10
Italujo:	S-ro A. L. Reni, Via Rovereto 6, VERONA, p.k. 9/16379, 800 lire.
Nederlando:	Kasisto Nederlanda Katoliko, Krugerlaan 195, GOUDA, p.k. 121449 f 4,50
Usono:	S-ro P. Golobic, 17724 Grovewood Ave, CLEVELAND 19 (Ohio) 1,50 dol.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Tiu ĉi anonceto aperas regule en ĉiuj grandaj Esperanto-revuoj. I.K.I. sendas informojn kaj legaĵojn senpage: tio tamen kostas multan monon kaj tial ni ĉiuj devas subteni tiun laboron per mondonacoj aŭ abono je la dumonata gazeto „Vojo, Vero, Vivo”. Abonprezo ned. guld. 1,20 aŭ 6 resp. kup. jare, al niaj reprezentantoj aŭ rekte al I.K.I. p.k. 268507.



ESPERO KATOLIKA

GARDANTA ANĜELO – PAC-ANĜELO.

Esperantistoj estas nature pacemuloj; ĉu por la „majstro” Zamenhof la „interna ideo” de lia lingvo ne estis: la paco inter la homoj? Despli: ni katolikaj esperantistoj devas „serĉi la pacon kaj alceli ĝin”. Nia dia Majstro, la Vorto de l’Patro super ĉio alportis la pacon, kiun la mondo ne povas doni. Pro tio ankaŭ la anĝeloj super la kampoj de Betlehemo kantis pri la paco al la homoj bonvolaj.

Jen ke senintence ni atingis la celon de tiu ĉi artikolo. Ni nome volas mediti pri la rolo kiun povas ludi la gardantaj anĝeloj por la paco inter la homoj kaj inter la popoloj.

Por kompreni tion ni pripensu unue la **karakteron** de la anĝeloj; due la **farojn** de la anĝeloj en la historio; dume aŭ trie ni konkludos kion ni povas esperi de ili kaj kion ili atendas de ni.

Tamen antaŭiras ankoraŭ ĝenerala rimarko: Ni kredas ke „gardantan anĝelon” havas unue ĉiuj kredantoj unuope (tion asertas nia katolika kredo); due (laŭ la komuna kaj sufiĉe certa opinio) ĉiuj aliaj homoj; sed ankaŭ trie kiel multaj ekleziaj Patroj kun granda probabileco instruas el la S. Skribo, la plej gravaj kaj eminentaj societoj kiel eklezioj, regnoj, provincoj, komunumoj k.t.p.

Estis necese antaŭmeti tiun rimarkon por kompreni kaj akcepti ne nur teorie sed multe pli praktike, la intervenon de la gardantaj anĝeloj por la paco.

La unua pruvo por tia rolo do estas la **karaktero** de la Anĝeloj. Ili estas puraj, nuraj spiritoj, do: senseksaj, sennaskaj, senfilaj kaj sekve de tio senpartiaj. Ili do pro sia tasko: alceli la honoron de Dio kaj la savon de la homoj, ĉie kaj ĉiam intencas kaj progresigas la pacon, tio estas laŭ la esprimo de S. Tomaso de Akvino: „la kvieton de la ordo”; jam per sia spirita esenco ili formas la harmonion inter la homo en lia materia parto, la korpo, kaj Dio, lau la diro de S. Augustino: „Du estaĵojn, ho Dio, Vi kreis: la unuan tre proksima al Vi (la Anĝelojn); la alian tre proksima al la Nenio (la Materion). La unua nenion havas super si krom Vi; la alia nenion havas sub si krom la Nenio”. Ĉar la aksiomo estas ke la agado sekvas la estadon, ankaŭ la agadoj de la anĝeloj estas direktataj al la harmonio, t.e. al la paco.

Per sia animo ja la homo interrilatiĝas kun la anĝeloj, iomete apartenante al la regno de la spiritoj; kaj tiel la harmonio, t.e. la paco inter la homoj progresiĝas laŭmezure ke ili kuniĝas kun la anĝeloj. Ĉu la afero de la paco ne multe profitus, se la homoj sekvus la admonon de la S. Spirito: „Rekonu, homo, vian dignecon”, Ĉu el tiu rekono ne kreskos la reciproka RESPEKTO, AMO kaj FIDO, la bazkolonoj de la paco? Do ni rekonu ĉiun internan kaj eĉ eksternan movon al la paco kiel venanta de la respektivaj gardantaj anĝeloj! Niaj anĝeloj admonas nin kiel ili ne estas partiaj pro kaŭzoj egoistaj, familiaj, sociaj, politikaj, naciistaj ktp. Pro nia „parenceco” kun la anĝeloj ni, kiel diras la Apostolo, devas konscii, ke „ni estas spiritaj”; nur tiam ni povas venki la materialismon, kiu en diversaj sistemoj minacas kaj neniigas la pacon.

Se tio unue koncernas la homojn individue, tamen ankaŭ, kiel jam dirite, por la homaj societoj oni devas rekoni la intervenon de la anĝeloj. Kvankam ne estas

dogmo de nia kredo, tamen el la antikvaj Patroj, kiuj baziĝis sur la S. Skribo, ni ne devas dubi ke diversaj societoj havas sian „gardantan anĝelon”. Oni pri tio legu ekz. Dan. 10, 21 ; 12, 1 ; Apok. 12, 7 ; la anĝelo (verŝajne Gabrielo) sin prezentis kiel la gardisto de la juda popolo kiel tera nacio, al kiu kontraŭstaris la anĝelo de Persujo kaj ankaŭ tiu de Grekujo, dum li aliparte ricevis helpon de la ĉefanĝelo Mikaelo; tiu ĉi nomiĝas la protektanto de la juda popolo kiel popolo de Dio kaj pro tio poste de la Eklezio. Tiuj anĝeloj interbatalis, kompreneble per spiritaj rimedoj: per sia volo, per disputo, precipe per fervoraj preĝadoj antaŭ Dio kaj submetitaj al la Dia volo, por la afero de la popoloj, kiuj estis transdonitaj al iliaj zorgoj. Nu : Dio nur pripensas pacon.

Sed kial ni opinius ke la helpo de la anĝeloj estus limigita al la nomitaj regnoj kaj landoj ; kontraŭe ni sekure povas kredi ke ankaŭ aliaj gravaj societoj ankoraŭ en tiu ĉi tempo havas sian propran protektantan Anĝelon ; ke ankaŭ nuntempe anĝeloj batalas por siaj popoloj Eŭropaj, Rusaj, Aziaj, Amerikaj k.t.p., kiel ankaŭ por provincoj, eble urboj kaj aliaj homaj komunumoj.

Por ni la praktika konkludo povas esti : ni havu respekton por ĉiu lando, popolo aŭ nacio „pro la anĝeloj”, kiujn Dio mem al ili donis ; ni kunsentu kun la anĝeloj, kun nia propra anĝelo kaj kun tiuj de aliaj por havi pacon reciproke ; ni prefere en niaj preĝoj apelaciu al la anĝeloj de popoloj kaj ties estraroj, por ke ili tie „loĝu kaj konservu ilin en paco” ; ni povas fari tion fide : se ni estas konstruistoj, ĉar la anĝeloj estas bona cemento por la „domo de paco” ; se ni estas elektristoj, ĉar la anĝeloj estas plej bonaj izoligiistoj por malhelpi rektkonektojn , se ni veturas motore, ĉar la anĝeloj estas bonaj skumoderigiloj por ke malebenaĵoj homaj ne interhaltigu la trafikon ; se ni funkciigas maŝinojn, ĉar la anĝeloj estas bona lubrikaĵo por ke la maŝinego homara bone funkcii ; k.t.p.: ĉiu en sia stato praktiku la anĝelan laboron por la paco. La Sinjoro donu al vi la pacon.

C. A. OUWENDIJK
 paroĥestro
 Vlissingen (Nederl.)



LA XXIVa INTERNACIA KONGRESO DE I.K.U.E. EN LOURDES.

Malgraŭ preskaŭ ĝenerala strikado de la francaj fervojistoj, tiu XXIVa kongreso estis bela kaj entuziasmiga elmonro de la vigleco de nia movado kaj de la amikeco kiu, super la landlimoj, unuigas ĉiujn gesamideanojn.

De la merkredo 12a ĝis la dimanĉo 16a sin sekvis mesoj kun prediko en Esperanto, partoprenado en la diversaj oficialaj ceremonioj de la mondscale konata pilgrimejo Lourdes, laborkunsidoj, ekskursoj ktp. kaj precipe, tiuj du- aŭ triopaj kontaktoj inter diverslandanoj, kiuj tiel efike kaj firme konsistigas la neŝanceblajn bazojn de nia movado.

Inter la 60 partoprenintoj ni dankas tutkore, pro la bono kaj intereso kiujn ili elportis al ni, al: Pastro Beckers kaj S-ro de Jong, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario de I.K.U.E., Pastro Carolfi, Pastro Thalmaier; Patro Vernoux, F-ino Le Boedec kaj S-ro Colas, estraranoj de la franca ligo.

En la sekvonta numero de E.K. ni donos la detalan raporton, sed, tuj nun, ni danku la Ciopovan Dion kaj nian Sinjorinon de Lourdes, kiuj bonvolis permesi al ni kunveni por preĝi kaj plifortigi nian fidon en la idealo de Esperantismo.

O. Ribot.



KIO ESTAS FELIĈO? II

Ni nun pripensu malrapide kaj atente unu vorton post la alia! La tezo tekstas jene: la feliĉo estas unuavice ripozado. La kontraŭo de ripozado estas moviĝo, aspiro. Se mi moviĝas, se mi ion aspiras, pruviĝas per tio la fakto, ke mi ne jam estas tute feliĉa, ke ĉiam ekzistas ankoraŭ io, kio ŝajnas al mi akirinda, kio mankas al mi. Kaj se mi sentas mankon, mi vere ne povas aserti, ke mi estas tute feliĉa. Vera, plena feliĉo do povas esti nur ripozado post atingo de la lastlasta celo, malantaŭ kiu alia celo ne plu ekzistas.

La atingita feliĉo plue devas esti mia certa, neperdebla posedaĵo. Se mi havus kaŭzon por timi, ke mi iam povus ĝin perdi, tiu ĉiama timo neniam permesus al mi plenan ĝojon pri mia feliĉo kaj ĝi ree ne estus perfekta. Pri tiu ĉi afero filozofa Nietzsche jam trafe diris: „Ĉiu ĝojo deziras eternecon, deziras profundan, profundan eternecon.” La filozofion de Nietzsche oni en multaj rilatoj ne povas aprobi, sed ĉirilate ĝi estas tute prava.

La aserto, ke feliĉo devas esti bonaĵo, ne bezonas specialan pruvon, ĉar malbonaĵon neniu aspiras. Tiu ĉi bonaĵo nun devas esti tiom granda, ke ĝi estas kapabla senreste trankviligi la sopiregon de nia koro. Pro tio ĝi nepre estu senlima kaj eterna. Se ĝi ne estus senlima, restus ĉiam en nia brusto la pli malpli granda dubo, ĉu ne ie en la universo ekzistas iu alia feliĉo, kiu estas eble ankoraŭ pli granda, ankoraŭ pli dezirinda ol tiu, kiun ni posedas nun. Kaj ĉiam ree ni komencus la serĉadon, maltrankvile, malkontente, senfeliĉe. La vera feliĉo devas ankaŭ esti eterna, sen komenco kaj sen fino. Se ĝi ne estus tia, la homa koro daŭre demandus, ĉu ne ekzistis en pli fruaj tempoj la deziregita aŭ ĉu ne ekaperos pli poste nur tiu feliĉo, kiu fine estos kapabla, tute ĝin pacigi. La vera feliĉo fine devas posedi absolutan perfektecon sen iu ajn difekto. Se ĝi ne estus perfekta, ĝi neniam kapablus plene nin kontentigi. Ĝiam ni sentus tiun mankon iel malagrabla. Kaj kiel ni vidas la malperfektaĵojn de nia kara proksimulo ĉiam pli bone ol liajn bonajn ecojn, same estus ankaŭ ĉikaze. Pro tio malperfekta feliĉo neniam kontentigus nin perfekte.

Ni nun resumu la aŭditan. La rezultato de niaj esploradoj estas jena: Nur senlima, nur eterna bonaĵo, kiu estas la kvintesenco de ĉia perfekteco, bonaĵo, kies pardon ni neniam devas timi, bonaĵo, kies posedo eĉ ne unu deziron, eĉ ne unu dezireton lasas neplenumita, nur tia kaj nenio alia estas kapabla, tute, senreste kaj por ĉiam doni al ni tion, kion ni ĉiuj tiom pasie aspiras — la feliĉon. Ĉu tia bonaĵo fakte ekzistas? Jes, ĝi ekzistas, kaj ĝia nomo estas — Dio!

Unu el la plej profundaj pensuloj de la tuta mondhistorio faris iam la por ĉiam memorindan eldiĉon: „Por Vi, ho Dio, vi kreis nin, kaj maltrankvila estas nia koro, ĝis kiam ĝi ripozos en Vi.” Nia koro estas, kiel jam dirite, nur malgranda parto de nia korpo. Sed laŭ la alkreita al ĝi naturo ĝi neniam povas kontentiĝi je malgrandaĵoj, ĝi postulas multon, multegon, ĉion — Dion. Neestingeble vivadas en ĝi la nemezureble granda sopiro al feliĉo, kaj se tiu sopiro ne trovas plenumon, la homo estus multe pli kompatinda kreitaĵo ol iu ajn besto. Sed ĝi trovas plenumon, certan, plenan, perfektan, ĉiaman plenumon en la brakoj de la patro ĉiela. Jen la lastlasta celo, kiun ni ĉiuj aŭ konscie aŭ subkonscie aspiregas, jen la solvo de ĉiuj problemoj, jen la respondo al ĉiuj demandoj, jen la plena paco por nia koro, jen — la feliĉo!

D-ro. Karl Friedl



La oktobra numero estos jubilea numero, kiu enhavos la raportojn pri nia 24a en Lourdes.

TUTMONDA LAŬDO KAJ LA KATOLIKA TERMINARO.

Esperanto estas facila lingvo, sed traduki en Esperanton estas tasko malfacila, kaj ju pli la tradukenda teksto apartenas al ia speciala tereno, des pli da neatenditaj problemoj rekontas la konsciencan tradukanton. Por la komunaj bezonoj nia „Plena Vortaro” estas sufiĉe ampleksa, sed por fakaĵoj oni ofte konsultas ĝin vane. Sendube tion spertis ankaŭ pastro H. G. Wannemakers S.J., la aŭtoro de la ĵus aperinta katolika preĝaro „Tutmonda Laŭdo”. Ankaŭ preĝaro ja apartenas al tereno nekomuna, kaj kvankam „Plena Vortaro” enhavas surprize multajn katolikajn terminojn, ĝi tiurilate ne estas —kaj ne povas esti— kompleta.

Se mi ne eraras, Espero Katoliká antaŭ multaj jaroj iniciatis la kreon de katolika terminaro, sed ne finis tiun entreprenon. Tio estas bedaŭrinda, ĉar la manko de de uniforma terminaro en katolikaj esperanto-publikaĵoj estas facile konstatebla, kaj kelkfoje ĝi efikas ĝene. El „Tutmonda Laŭdo” mi notis i.a.:

1. Pastro Wannemakers uzas la formojn **Jesuo** kaj **Jesu Kristo**. En P.V. mi trovis **Jesuo** kaj **Jezuo** kaj (sub **Eŭkaristio**) **Jesu-Kristo**; en la antaŭmilita „Spirita Juvelaro” („tradukita de P.P. Pastro”): **Jezu** kaj **Jezu-Kristo**, en „Katolika Preĝaro” de Renou (eld. Espero Katolika en 1907 !): **Jesu**, **Jesuo** kaj **Jesu-Kristo**.

2. Varias ankaŭ la mesterminaro: p.W. **graduala kanto**, Renou **graduelo**; W. **traktuo**, R. **trakto**; W. **introitus**, R. **introito**, Spir. Juvelaro **enira kanto**; W. **Kirie**, Sp. Juv. **Kyrie Eleison**; W. **prefaco**, R. kaj Sp. Juv. **prefacio**; W. **sankta**, Sp. Juv. **sanktus**, R. **sanctus** ktp.

3. Aliaj katolikismoj ĉe Wannemakers: **kandelfesto** (2a de Febr., Sp. Juv. **puriga festo**); **Savanto** (Sp. Juv. **Redemptoro**); **riveli** (en P.V. nur fototeĥnika esprimo; Sp. Juv. **malkovri**; Smeehuijzen en „Nia Mesmistero” **revelacii**; Renou **riveli**); **kompletoj**, **votivaj mesoj**, **mortiga peko** (Zamenhof **mortomerita peko**); **tag-oko**; **Regadoj** (anĝeloj, latine **dominationes**; Sp. Juv. kaj Renou **Domincioj**); **preĝa apostolado**; **ekpreĝetoj**; **devena makulo**.

4. La problemo de la propraj nomoj en Esperanto ŝajnas nesolvebla. Pastro W. esperantigis la verajn nomojn: **Aŭgusteno**, **Johano Krisostomo**, **Hironimo** ktp. La malnovtestamentaj nomoj tamen plej ofte ne havas la finiĝon -o: **David**, **Israel**, **Abraham**, **Jesaja**, **Azarja**, **Miŝael**, flanke de la o-finaĵoj **Jakobo** kaj **Mikaelo**.

La formo **Aŭgusteno** — kiun mi ankaŭ ĉe aliaj aŭtoroj renkontis — evidente celas eviti ke oni legu **Aŭgust-in-o**, sed tia miskompreno estas tiel neverŝajna, ke ĝi certe ne pravigas tiel perfortan kripligon. **Hironimo** (kun esperanta akcento!) pensigas pli pri japana urbo ol pri sankta Hieronymus.

La esperantigo de la viraj nomoj ne okazis laŭ striktaj reguloj: **Pontius (Pilatus)** kaj **Basilus** fariĝis **Poncio** (kun i), sed **Laurentius**, **Gregorius** kaj **Ambrosius** fariĝis **Laŭrenco**, **Gregoro** kaj **Ambroso**. **Clemens** fariĝis **Klemenco** kaj ne **Klemenso**; flanke de **Thomas** = **Tomaso** staras **Lucas** = **Luko**.

La virinaj nomoj ĝenerale ne finiĝas per -o: **Maria**, **Eva**, **Veronika**, **Agnes**, **Agata**, **Lucia**, **Felicitas**, **Judit**, sed ankaŭ **Elizabeto** (kaj **Elizabet**) kaj **Margareto Maria**, (sed **Maria Magdalena**).

Mi povus aldoni multajn aliajn ekzemplojn pri la ŝanceliĝa stato de nia katolika terminaro, sed mi opinias tion superflua. Kiu interesiĝas pri la problemo povas facile mem kolekti abundan materialon. Kompreneble miaj konstatoj neniel celas kritiki la lingvan kvaliton de „Tutmonda Laŭdo.” Mankas ankoraŭ oficiala solvo de la aluditaj problemoj, kaj pastro Wannemakers havis la rajton proponi tiun solvon kiu ŝajnis al li plej akceptinda. Tiun rajton li saĝe uzis kaj tial lia preĝaro

havas ofte personan stampon. Rezultis libro interesa ne nur laŭ enhavo sed ankaŭ el lingva vidpunkto.

D-ro W. MANDERS.



KIU SIN BANOS ?

Paroĥestro deziris klarigi por sia komunumo la dialektikan materialismon. „Imagu”, li parolis, „ke oni proponas banon al pura kaj al malpura viro. Kiu akceptos laŭ via opinio?” „La malpura”, estis la unuvoĉa respondo. „Ho ne”, diris la paroĥestro, „La pura sin banis, ĉar li kutimis esti pura, dum la alia kutimis esti malpura. Ĉu vi komprenas, kio estas dialektika materialismo?” La komunumo skuis nee la kapojn. La paroĥestro ripetis sian demandon. „Nu, kiu sin banis?” „La pura” la aŭskultantoj respondis kaj opiniis, esti pravaj. „Ho ne”, la paroĥestro diris, „la malpura, ĉar por li estis necese”. Mire la kunvenintoj ree skuis la kapojn. „Nu”, la paroĥestro diris, „do refoje: Al viro pura kaj al viro malpura oni proponas banon. Kiu akceptos?” „Ho”, la demanditoj respondis, „ambaŭ”. „Ho ne”, la paroĥestro diris, „neniu akceptos”. Ĉar la unu estas jam pura sen ĝi kaj la alia preferas, resti malpura. Nu, lastfoje mi demandas vin: Kiu viro akceptos la banon? „Neniu!” vokis la komunumo kiel unu homo. „Ree vi komprenis malbone”, la paroĥestro diris, „ambaŭ akceptus banon. La pura viro banas sin plezure kaj la malpura bezonas ĝin. Ĉu nun vi komprenas, kio dialektika materialismo estas?” „Kiel ni komprenu ĉi tion, se vi donas al ni ĉiufoje alian respondon”, ekvokis incitita paroĥano. „Ho”, diris la pastro, „jen la dialektika materialismo”.

Laŭ „Tarantel”, Berlin.



AGADO POR LA BLINDULOJ-ESPERANTISTOJ.

En la junia numero de E.K. estis interesa artikolo pri okulbanko. Bedaŭrinde ankoraŭ multaj estas la blinduloj, kies blindeco ne povas esti kuracata pere de sana okulmembrano. Ni ja deziras ke progresoj okazu, sed dume ekzistas, kaj verŝajne longtempe ekzistos, blinduloj.

Ĉe ili Esperanto estas multuzata. Sed ŝajnas, ke la porblindula agado de la Katolika Esperantistaro estas malampleksa. Tamen mi spertis, ke blinduloj en multaj landoj bezonas kaj deziras nian helpon. Estus bone ke io estu organizata.

Mi do alvokas al ĉiuj legantoj, kiuj deziras helpi al blinduloj, precipe per brajla skribado, sur la katolika tereno. Kiuj jam okupiĝas pri blinduloj ankaŭ sin konigu. Kiu deziras respondon almetu reafrankon.

Ankaŭ blinduloj povas skribi, brajle, pri siaj deziroj ktp.

Al interesiĝantoj estos proponata plano por agado.

S-ro Gaston Veron,

36 Grande Rue, DOMFRONT (Orne), Francujo.



NI GRATULAS !

La 29an de Junio festis nia fervora samideano, pastro Alois Gruber en Landaŭ/Isar, Germanujo, sian oran pastro-jubileon. Per meminstruado li lernis Esperanton en 1920. De tiam li multe okupis sin per legado kaj korespondadis kun 20 diversaj landoj el ĉiuj kontinentoj. Dank' al lia fervora kaj oferema laboro ebligis ankaŭ en Landaŭ fondi E-grupon en 1950, kiun li subtenis spite al sia malsaneco kaj granda aĝo, kiel instruisto kaj sekretario. Dio donu al li ankoraŭ multajn fekundajn jarojn!

ENKETO PRI LA ESPERANTO-LITERATURO EN PUBLIKAJ BIBLIOTEKOJ.

La celo de ĉi tiu enketo estas:

1. ekscii en kiu grado la Esperanto-literaturo jam troviĝas en publikaj bibliotekoj.

2. ekscii kion ni plej bone faros en la estonto sur tiu ĉi tereno. Nia scio pri la hodiaŭa disvastiĝo montriĝas tre grava, ĉar estas karakteriza noto de la Esperanto-literaturo, ke ĝi plejgrandparte ĝis nun estas eldonita en malgrandaj kvantoj kaj krome disvastiĝis tra la tuta mondo. La rezulto estas, ke multaj eldonoj ne plu aŭ tre malfacile estas troveblaj.

Krome la literaturo troviĝas ĝenerale nur ĉe privatuloj, kies posedaĵo ne estas konata kaj kiuj ne tiel facile povas disponigi la verkojn al petantoj.

Ju pli Esperanto evoluas kaj estas aplikata, des pli grandiĝas la valoro de la antaŭaj eldonoj, speciale por sciencaj, lingvistikaj kaj historiaj serĉadoj.

Tial ni proponas enketon pri la disvastiĝo de la Esperanto-literaturo en la publikaj bibliotekoj kaj tiel ni provas ekscii kaj konatigi kie oni povas konsulti, pruntepreni aŭ fotokopiigi tiujn eldonojn.

Alia efiko povas esti, ke ni retrovas valorajn verkojn, kiuj eble povas reeldoniĝi. Tiu ĉi konstato tre gravas, ĉar la milito jam pereigis multon, kaj nur per taŭga distribuo de Esperanto-verkoj aŭ de ĝiaj fotokopioj ni povas savi, kio restis.

La agado en la estonto ne nur valoras por la uzado de la jam aperintaj verkoj, sed ĝi povas ankaŭ esti stimulo por la taŭga distribuado de la plej gravaj libroj kaj revuoj al la publikaj bibliotekoj.

Demandaro pri la hodiaŭa situacio.

1. Kiuj publikaj bibliotekoj (lokaj, regionaj, institutaj) posedas fakon de Esperanto-literaturo? Bonvolu indiki la nomon, adreson kaj karakteron de la bibliotekoj.
2. Kiu estas proksimume la nombro de la Esperanto libroj en ĉiu?
3. Kiu estas proksimume la nombro de la Esperanto revuoj en ĉiu?

Se eble:

4. Kiuj abonoj je revuoj daŭriĝas?
5. Kiuj gravaj revuoj kolektoj tie troviĝas?
6. Kiuj maloftaj libroj tie troviĝas?
7. Kiuj maloftaj revuoj tie troviĝas?
8. Ĉu ekzistas presita katalogo de la libraro?

Rimarkoj:

1. Ni limigas tiun ĉi enketon al Esperanto libroj kaj revuoj; ne temas pri dokumentoj, fotoj, muziko ktp.
2. La enketo nur koncernas Esperanton, ne aliajn mondlingvojn.

Demandaro pri estonta agado.

Dum la enketo nur koncernas la hodiaŭan staton, ni donas kelkajn sugestojn ankaŭ en demando-formo:

1. Ĉu jam ekzistas en via loko (regiono, instituto), persono aŭ grupo de personoj, kiuj pristudas la distribuon de Esperanto-literaturo en bibliotekoj?
2. Se ne, ĉu iu(j) povas interesiĝi pri tio, se montriĝus utile agadi por tiu ĉi celo?
3. Ĉu la direkcio mem de la biblioteko deziras aĉeti librojn kaj revuojn en Esperanto?
4. Ĉu privataj personoj aŭ grupoj deziras provizi tiun bibliotekon je Esperanto-eldonoj? Ekz. per aĉeto, abono, aŭ per donacado post legado.
5. Ĉu eble la propono taŭgas, ke parte la Esperantistoj prizorgas tiun provizon kondiĉe ke la bibliotekestraro aĉetos alian parton?
6. Kiuj libroj kaj revuoj estas la plej taŭgaj por tiu biblioteko?

Rimarkoj:

1. Ĉu vi deziras publikigadon pri la rezulto de tiu ĉi enketo?
2. Ĉu vi eble aplikis alian metodon, kiu montriĝis efika?

Prof. H. G. Wannemakers S.J.

Ĉi tiu artikolo aperis antaŭ kelkaj monatoj en „Scienca Revuo”. Laŭ informo de Prof. Wannemakers ĝi ankoraŭ estas aktuala, tial ni represas ĝin.

S-ro F. Winkel, Plataanweg 18, Rotterdam-N. funkcias kiel centro al kiu oni povas sendi materialon por ĉi tiu laboro, kiu okazas en la kadro de la Centro de Esploroj kaj Dokumentado. — Red.

**ĈU PAROLOJ ESTAS ARGĜENTAJ? AGO ORA ESTAS!**

Ĉu la unua celo de Esperanto estas lernado de iu praktika lingvo? Nature ne! La elirpunkto de Zamenhof estis socia fakto: diverslingvaj homoj malfacile amas unu la alian. Pere de sia lingvo li esperis helpi al interkompreno kaj universala amo. Kiam efektiviĝos tiu idealo? Ĉu lingvo sufiĉas por tio? Ni Kristanoj scias,

ke amo nur dono de Dio estas, sed tio estas nur kialo por plivastigi la planon de nia agado, ne motivo por forlasi ĝin, atendante, ke la Sinjoro faru ĉion sola!

Se nun Esperanto nur estas ilo, kiel ni uzos ĝin? Certe intereseĝaj estas la klasikaj kontaktoj per revuoj, korespondado, kongresoj kaj personaj vizitoj. Kaj ni povas jesi, ke ju pli persona estas kontakto, des pli efika ĝi fariĝas por nia celo.

Oni plendas, ke la milito malhelpis nian agadon. Neneeble! Sed ni tiam pli intense klopodos. Ju pli kontraŭbatalata nia idealo estas, des pli multajn okazojn ni havas por traduki ĝin per faktoj, ĉar amo ne estas katenebla. Dum la lasta milito persekutataj estis iuj samideanoj en Germanujo. Sed dank' al esperantaj adreslibroj ili povis trovi en Belgujo kaj aliaj landoj amikojn, kiuj ricevis ilin kaj helpis fuĝi.

Post la milito ni perdis multajn anojn malantaŭ la Fera Kurteno. Sed ni pripensu, ke pli ol unu Esperantisto rifuĝis en Okcidenton, precipe en kampadejojn en Germanujo kaj Aŭstrujo.

Antaŭ unu aŭ du monatoj mi kvazaŭ hazarde ricevis poŝtkarton de nekonata samideano, kiu kiel „Delokigita Persono” vivas en aŭstra barakaro. Ĝis 1939 li estis vicprezidanto de U.E.A. en jugoslava urbo. Mi ĝojiĝis ekkorespondi kun li kaj sendi esperantan legaĵon.

Certe estas tio la unua ebleco por montri nian bonvolon al tiaj malesperantaj, se ni amike kun ili interrilatas, ĉar ili pli bezonas veran simpatian ol la tiel necesajn vivrimedojn. Nature se ni vere simpatias kun ili, ni ne kontentiĝos per vortoj, sed ni serĉos kiel ni povos helpi ilin, ĉu per sendado de poŝtmarkoj aŭ respondkuponoj por ebligi la respondon, ĉu per paketoj de manĝaĵoj aŭ de vestaĵoj. Sed pri tio ni ankoraŭ parolos, se l'afero efektive vin interesas.

Mi jam demandis en Germanujo ĉe Ostpriesterhilfe (Orienta Sacerdota Helpo) pri adresoj de esperantistaj sacerdotoj aŭ aliaj rifuĝintoj, kiujn ni povus adopti. Ankaŭ per aliaj vojoj mi serĉos adresojn.

Kiu volas helpi tiajn fratojn, skribu al „Ostpriesterhilfe. Esperanta Sekcio. *Saint-Vith*, Belgujo.” Ĉe la sama adreso vi povos ricevi ĉiujn informojn pri la ĝenerala agado de Orienta Sacerdota Helpo, ĉu letere, ĉu per nederlandaj, francaj, germanaj, anglaj, hispanaj kaj baldaŭ ankaŭ italaj propagandiloj. Benu la Sankta Virgulino de la Malriĉuloj, kiu venis por ĉiuj nacioj, nian fratan interhelpon.

Louis Muller, sac.

★★★

RECENZOJ

Elio Migliorini: *Esperanta Legolibro*. Tria eld. plene reviziita kaj pligrandigita. Eld.Paolet, San Vito al Tagl. Italujo. 188 pĝ. Prezo 380 lir. = f 2,35. Plej diversaj rakontoj, anekdotoj, proverboj, lingvaj problemoj, fragmentoj el la esp.mondliteraturo proza kaj poezia, formas la multkoloran enhavon de ĉi tiu meritplena helpilo por progresantoj en nia lingvo. Ni varme rekomendas. T.D. ★★★

Wilhelm kaj Hans Wingen: *Post la kurso*. Verlag der Limb. Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germanujo. Por germanlingvanoj praktika, bonega perfektiga lernolibro, enhavanta multajn rakontojn kaj ekzercaĵojn kun klarigoj pri la gramatikaj reguloj, vortfarado ktp. kaj vortlistoj. Plaĉa aspekto, klara preso kun spritaj ilustraĵoj. Prezo gm. 3,60 = f 3,30; ŝlosilo (solvo de la taskoj) gm. 1,20 = f 1,10. T.D. ★★★

D-ro Ludwig Wegener: *La arto fariĝi centjara*. Eld.Limb.Vereinsdruckerei, Limburg, Germ. Prezo gm. 1,20 = f 1,10. Jes, tio vere ŝajnas esti arto, ĉar la verkinto klarigas ke tio tute dependas de la vivmaniero, speciale de la nutraĵo. La tro abunda, tro grasa nutraĵo kaŭzas ĉiajn malsanojn, precipe kanceron, dum asketa vivmaniero efikas sanige. Oni evitu viandon, fiŝon, ovojn, grasoĵojn, tabakon, kafon, teon, alkoholaĵojn ktp.; kontraŭe oni manĝu multajn nekuiritajn verdaĵojn, fermentitajn brasikojn kaj fazeolojn, terpomojn kun la ŝelo, nigran panon, krudajn avenerojn, bulbojn, karotojn ktp. Se vi sekvos la konsilojn de D-ro Wegener vi povos atingi la aĝon de 100-140 jaroj, almenaŭ se vi ne antaŭe perdis la vivon sekve de akcidento. Ni tamen pridubas ĉu multaj homoj dezirus vivi tiel longe, se ili rigore devas elimini ĉiujn aferojn kiuj ordinare pliagrabiligas la vivon! La libreto plaĉe aspektas kaj estas verkita en bonega Esperanto. T.D. ★★★

Hasan Basri: *Peladjaran Bahasa Pantja-Benua Esperanto*. Ringkas Djelas. Medan, 1952. 94 paĝoj, folia formato, multobligita, prezo neindikita.

Terdjemahan „Latihan 2” dari buku Peladjaran Esperanto. Ringkas Djelas. 15 paĝoj.

Multaj jaroj jam pasis post la apero de la malaja lernolibro de Esperanto de s-ano Liem Tjong Hie. Nun en la Indonezia lingvo lernolibron kun ŝlosilo prezentas Hasan Basri. Ne estis facila tasko pro la juneco de la Indonezia nacia lingvo kaj pro ties tute alia lingva karaktero. La verkinto bone sukcesis, per multaj ekzercoj li ebligas taŭgan studadon. Bedaŭrinde mankas tabelo de enhavo kaj vortaro. Ni volonte deziras al la verkinto grandan sukceson, ĉar Indonezio povas akiri grandajn servojn de Esperanto. H.G. Wannemakers, S.J. ★★★

ESPERANTO VIVAS!

La Ŝtata Ĝarden-Eksperimentejo en Alnarp, Akarp, Svedujo aperigas plurfoje ĉiujare laborraporton kiu estas dissendata al universitatoj, bibliotekoj, ĝardenaj eksperimentejoj ktp. en la tuta mondo. La raportoj enhavis ĝis nun rezumojn en angla lingvo, sed ek de ĉi tiu jaro oni rezumas la artikolojn en Esperanto.

★★★

La germana horarlibro por la Fervojoj, kiu aperis en 50.000 ekzempleroj, enhavas la klarigojn en franca, angla, kaj nun ankaŭ en esperanta traduko.

★★★

Jam en multaj universitatoj Esperanto estas instruata. Nun ankaŭ en la episkopa universitato de Porto Alegre, Brazilio, kaj en la universitato de Bologna, Italujo.

★★★

La katolika Esperanto-movado en Aŭstrujo estas tre vigla. Ofte okazas gravaj kunvenoj kun di-servoj, predikoj en Esperanto, ktp. Multaj eminentuloj, scienculoj kaj sacerdotoj estas inter la membroj. Oni tre bone kunlaboras kun IKUE kaj AEF.

★★★

La aŭstralia Registaro pretigis dokumentigan kolorfilmon pri Aŭstralio kun sono en Esperanto, titolitan „Aŭstralio Hodiaŭ”. Daŭro duonhoron. S-ro Ralph Harry, eminenta esperantisto kaj membro de la aŭstr.ministerio de Eksterlandaj Aferoj iniciatis la aferon kaj verkis la komenton, kiun parolis s-ro G.Alan Connor, la ĝenerala sekr. de Nordamerika Esp.Asocio EANA. Estos eble montri la filmon en ĉiuj landoj de la mondo.

★★★

„Internacia Kulturinterŝanĝo” estas la temo de la Sveda Somera Semajno kiu okazis de 9 - 16.9 en Frostavallen, Höör (Skanio), sub aŭspicoj de la Sveda Instituto por kulturaj rilatoj kun eksterlando kaj Sveda Unesko-Konsilantaro.

★★★

La influhava nederl. katolika kultura revuo „Streven” publikigis kelkpaĝan artikolon de prof. H. G. Wannemakers S. J. sub titolo „La Esperanto-movado de post 1945”. La eminenta belga scienca revuo „Wettenschappelijke Tijdingen” reprenis ĝin en sia julia numero sub titolo „Ĉu la lingvo de estonto?”

★★★

Senpagajn faldfoliojn esperantlingvajn ni ricevis pri jenaj urboj: Hannover; Städt.Verkehrs- u.Presseamt, Hannover, Germanujo. Oberammergau kaj Ettal; Benediktana Monaĥejo Ettal, Bavario, Germanujo.

Nord-Norvegujo — Bodo; Esperantoklubo, Urtegardsgata 26, Bodo, Norvegujo.

Berlin; Verkehrsamt, Fasanenstr. 7-8; Berlin-Charlottenburg 2.

Skribu poŝtkarton al la indikitaj adresoj kaj petu alsendon.

TRA LA KATOLIKA MONDO

La 3a Internacia Semajno de la Religia Filmo okazis de 19-26.4. en Vieno sub protekto de kardinalo d-ro Innitzer, ĉefepiskopo d-ro Rohrbacher, protestanta episkopo d-ro Maj kaj aŭstria instrumministro d-ro Kolb. Ĝi estis aranĝita de la Katolika Filmkomisio por Aŭstrujo, kies gvidanto estas katedrala kapitulano d-ro Karl Rudolf, kiu ankaŭ montris sian favoron al nia katolika E. afero. Multaj eminentuloj el diversaj landoj ĉeestis, i.a. la hinda ambasadoro en Vieno. Diversaj, parte tute novaj, diverslingvaj religiaj filmoj estis prezentataj; bedaŭrinde ne ĉiam plene komprenitaj de ĉiuj: ĉi tie Esperanto povus ludi gravan rolon! ★★★

Nuntempe laikaj misiistoj multnombre dediĉas sin al la servo de la katolikaj misioj, ne nur kuracistoj, flegistinoj kaj geinstruistoj, sed ankaŭ diversmetiaj kompetentuloj. La nederlanda agrikultura inĝeniero J. Heyman ekzemple laboras en Pakistan; la episkopo de Rawalpindi deklaras, ke li faras treege utilan laboron, eble pli ol 2 aŭ 3 misiistoj povus fari. Per siaj konsiloj kaj metodoj li helpas la kamparanojn, por tiamaniere plialtigi la vivnivelon de la popolo. Tiel la Eklezio samtempe portas animan kaj materialan bonfarton. ★★★

Mons-ro Georges de Jonghe d'Ardoye, Apostola Internuncio en Indonezio deklaras, ke la Eklezio en tiu lando ĝuas plenan liberecon. La salajroj de geinstruistoj je katolikaj lernejoj, ankaŭ de religiuloj, estas pagataj de la Ŝtato; en la armeo servas multaj armepastroj kiuj havas altajn rangojn. La Registado subtenas diplomatiajn rilatojn kun la S. Seĝo. ★★★

De 3-6.7. okazis en Lourdes kongreso de antaŭaj militistoj el ĉiuj landoj partoprenintaj al la lasta mondmilito. Dekmiloj da eksmilitistoj kunvenis por fari „Ofensivon de la Paco”, sub la protekto de plej altaj ekleziaj kaj ŝtataj instancoj kaj sub gvidado de Kardinalo Tisserant. Tiamaniere oni volis ne nur preĝi por la paco, sed ankaŭ per amikiĝo de iamaj „malamikoj” forigi ĉiujn barilojn inter la popoloj. La diverslandaj ligoj de eksmilitistoj organizis la partoprenon; la prezidanto de la israela ligo, kies membroj ĉiuj konfesas la judan religion, esprimis sian simpatian kaj skribis ke la eksmilitistoj en Israel enpreĝe unuiĝos kun siaj kamaradoj alilandaj dum la tagoj de la pilgrimo. ★★★

Mons-ro Thomas Niu Hui Ching en Yankou, Ĉinujo, eldonis mesaĝon en kiu oni legas: „Vero estas, ke ne jam spertita ventego muĝegas trans la eklezion en Ĉinujo. Vero estas, ke la misioj estas tute ruinigitaj. Vero estas, ke en tuta Ĉinujo nuntempa ĉia religia agado -se ne nuligita- minimume estas lamigita. Sed la sola, nepre necesa, estas sana: La vivado el la kredo estas en Ĉinujo pli vigla ol iam; ĉiutage la ĉinaj katolikoj konfesas fiere sian kredon.” ★★★

Okaze de Pax Christi - kongreso rev. kanoniko Maillet, gvidanto de la kantistaro de la Ligna Kruco rakontis, ke la kantistetoj povas kanti entute en 14 lingvoj; ilia kantaro enhavas religiajn kaj folklorajn verkojn. Kompreneble ili ne scias ĉiujn tiujn lingvojn kaj do ne komprenas la loĝantojn de la diverslandaj urboj kiujn ili vizitas. Demandite pri Esperanto, mons-ro Maillet afable respondis ke li dum sia juneco studis la lingvon, kaj por pruvi ke li ne ĉion forgesis, esperantlingve aldonis: „Ĉu vi parolas Esperanton?” Ni esperu ke la kantistetoj de la Ligna Kruco ĉiuj eklernu Esperanton por ke ili ne nur povu kanti en nia lingvo, sed ankaŭ interparoli kun pli da homoj dum siaj diversaj vojaĝoj. ★★★

VERDLANDO VOKAS

Radio-dissendoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj.

Mallongigoj: I = informoj; P = parolado; K = kurso; M = miziko.

Tempindiko laŭ mezeŭropa horsistemo.

Dimanĉe: 09.24 - 09.30 Osijek (Jugoslavujo), 202,2 m. I.

Lunde: 22.35 - 18.40 Vieno I, 25,46 m. 48,74 m. 513 m.: P.

Marde: 12.55 - 13.00 Bern, 31,46 m. 48,66 m. P.

16.00 - 16.20 Vieno II, 25 m. 30 m. 41 m. 48 m. 203
m. P. (ĉiuduamarde)

18.35 - 18.40 Bern, 31,46 m. 48,66 m. Ripeto posttag-
meza dissendo.

Merkrede: 16.45 - 17.00 Graz (Aŭstrujo), 417,2: K (ĉiuduamer-
krede.)

19.00 - 19.20 Roma 25,21 m. 31,35 m. 49,92 m. P.

20.30 - 21.00 Madrid (Radio S.E.U.) 42,33 m. 225 m. P.

22.45 - 23.15 Valencia 43 m. P. kaj I.

23.15 - 23.20 Hilversum II, 298 m. 188 m. VARA I.

Ĵaŭde: 00.05 - 00.20 Zagreb (Jugosl.) 264,7 m. I.

08.35 - 08.40 Rijssel (Lille) (Francujo) 218 m. I.

09.30 - 09.45 Paris 348 m. K.

12.55 - 13.00 Bern 31,46 m. 48,66 m. P.

18.35 - 18.40 Bern „ „ (ripeto)

Vendrede: 19.00 - 19.20 Roma 25,21 m. 31,35 m. 49,92 m. P kaj M

23.15 - 23.30 Hilversum II, 298 m. 188 m. NCRV: P
kaj M. (nur 1. kaj 3. vendredon de ĉiu monato).

Sabate: 09.30 - 10.00 Rio de Janeiro 30,71 m. 375 m. K. kaj I.

23.15 - 23.20 Hilversum I, 402 m. KRO: I.

Aŭskultu regule kaj de tempo al tempo sendo dankleteron al
koncernaj stacioj.

Informojn pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radio-
stacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S.S. de Jong Dzn.
Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TJERKWERD (Frislando)
Nederlando.

Deziras korespondi nederl. porpastra studento kun hispana ko-
lego en Esperanto kaj en hispana lingvo. Frato H.v.d.Werff, Ferd.
Bolstr.108-hs. Amsterdam-Z.

Redakcia leterkesto. Dankon pro la multaj artikoloj, enigmoj ktp.
ricevitaj. Siatempe ĉio uzebla trovos lokon. Ne forgesu indiki la
gazeton el kiu vi ĉerpis eltranĉaĵon: ni nome ne rajtas represi
nemenciante la fonton!

El ĉiuj direktoj ni ricevis laŭdojn pro la bela aspekto de nia
revuo: ĉiuj klopodu gajni novajn abonantojn, por ke ni povu
pliampleksigi E.K. kaj ornami ĝin per ilustraĵoj.

Jubileaj donacoj por E.K. La lasta listo aperos en la Okt.-no.
Ni tre dankas al ĉiuj kiuj intertempe jam sendis siajn donacojn.

L I B R O L I S T O .

*Nur por kleraj plenkreskuloj. Afranko 10 ⁰ / ₀ alkalkulota. Prezoj en ned. guld.	
*Baekelmans, Elektitaj noveloj	f 0,80
J. Baghy, La verda Koro, por progresantoj	- 2,25
* „ Verdaj Donkiĉotoj	- 2,00
P. Bennemann, Miru, pensu, ridu !	tolbind. - 5,40
*Boudier-Bakker, Surprizoj, trad. Tekla Flint, broŝ. f 3,75	„ - 4,50
H. Bulthuis, Idoj de Orfeo, 540 pp. nur bonaspektaj uzitaj ekz.	f 1,90
„ Inferio, romano pri Ameriko	bind. - 2,90
„ La Vila Mano, ilustrita	„ - 3,40
v.d.Cammen, La Geedzeco, 78 pp.	- 0,25
Sac. Carolfi, La Padova Lilio (S. Antonio) ilustr.	- 0,50
„ La Reformanto (S. Francisko de Asisi) ilustr.	- 0,50
„ Preĝareto, la plej gravaj preĝoj, S. Meso ktp	- 0,75
Chesterton, La naiveco de pastro Brown, detektiva	bind. - 3,10
Collodi, Pinokjo, trad. Marchesi	broŝ. f 1,50 bind. - 3,10
Degreef, La radianta Lotuso	- 1,25
Delsuno, Formortinta Delsuno, rakontita de li mem! amuza	- 1,25
Dickens, La Batalo de l'Vivo, ilustr.	tolbind. - 1,95
V. Dorno. La Aventuroj de L.R.M. Sultulof la Xa, sprita	- 0,55
*Fr. van Eeden, La malgranda Johano, trad. H. Bulthuis	- 1,20
Eola, La amo en la jaro dekmil, 350 pp.	bind. - 2,85
Edna Ferber, Fanny, trad. B. Fabo.	tolbind. - 3,10
J. Filip sac., Ĉeĥoslovakaj popolkantoj en Esp. k muziknotoj, ilustr.	- 2,25
*Forst de Batt., La mistero de l'Sango (scienca)	- 1,50
W. Fricke, Universala legolibro	- 1,25
Gerstäcker, La Maro, rakontoj el marista vivo	bind. - 2,10
Wilh. Hauff, La Kantistino, trad. Wüster	- 0,45
*A. Hekler, Arthistorio, trad. Kalocsay, 146 fotoj, broŝ. f 7,—	bind. - 8,00
Heroldo, Mozaiko, div. rakontoj kaj skizoj	- 0,30
„ Sub la Signo de l'Espero, rakontoj el Esp. vivo	- 0,30
D.ro Kabe, Unua Legolibro	- 1,25
Kalocsay, La Gramatika karaktero de la Esp. radikoj	- 0,40
„ Dek du poetoj	broŝ. f 2,— bind. - 2,50
*H. Kirk, Taglaboristoj	bind. - 2,90
M. Koenen, La Sunkrono, novelo	- 1,25
*Korolenko, La sonĝo de Makaro, trad. M. Ŝidlovskaja	- 0,40
*Limburg Br., Akbar, orienta romano	lukse bind. - 3,50
Dan Lord S.J., Flirto, 48 pp.	- 0,15
Ign. de Loyola, Spiritaj Ekzercaĵoj	- 0,85
Luycken, Stranga Heredaĵo	bind. - 2,90
„ Pro Iŝtar	tolbind. - 4,50
D.ro Manders, Esperantologio kaj Lingvistiko	- 2,25
*Maxwell, Anstataŭa Edzino	bind. - 2,85
F. Molnár, La Knaboj de Paŭlo-Strato	- 1,20
Montfort, La Mistero de Maria	- 0,55
Müller, Rembrandt, La Magiisto, k. 100 reprod.	bind. - 5,00
*de Musset, La du Amatinoj k. aliaj noveloj	- 1,25

G. Norway, La Aventuroj de Marteno Drake	bind. f	2,75
E. Pizzi, La Floretoj de S. Francisko de Asisi	-	0,70
„ La Protektanto	-	0,25
E. A. Poe, Ses Noveloj	-	0,75
*D-ro Privat, Vivo de Zamenhof	bind. -	3,10
Raimund, La Malŝparulo	-	1,20
Randag C.s.s.R., Ĉu vi sciis tion pri la Framasonismo?	-	0,25
Reitzel, Aventuroj de Malspertulo	-	0,45
Roche S.J., Nia Mesmistero	tolbind. -	0,75
M. Sabbe, Virina Koro	-	0,65
Ŝal. Alejhem, Hebreaj Rakontoj	-	0,75
*Schreiner, Romano pri Afrika Bieno	-	1,50
Shakespeare, Antonio kaj Kleopatra	-	1,50
„ Romeo kaj Julieto	-	1,50
„ La gajaj Edzinoj de Windsor	-	2,00
Sienkiewicz, Noveloj, trad. Lidja Zamenhof	-	0,75
J. Smeehuijzen S.C.J., La Katolika Librelektilo	-	1,50
Storm, Du Majstronoveloj	bind. -	2,10
Stuttard, La Virineto en Bluo	-	2,30
van Sutter, Potenco Infera, pri du demonposedataj infanoj	-	0,75
*Szilagyi, Dua Rapsodio, Tria Rapsodio	po -	1,80
*Th Thijssen, La nevenkebla ĝeno	bind. -	4,90
Timmermans, Kristnaska Triptiko, ilustr.	-	0,50
*Turgenjev, Elektitaj noveloj	-	0,75
Uytterdijk, S-ro Longkrurulo, k. 152 bildoj	-	1,25
Vanweddingen, Sub la vitra Kupolo, romano	-	1,25
v. d. Vondel, Jozef en Dotan, biblia tragedio	-	1,25
Wannemakers, Tutmonda Laŭdo, preĝlibro	-	4,85
*H. G. Wells, La Dormanto vekigis	bind. -	3,10
* „ La Tempo-maŝino	-	1,20
Wisemann, Fabiola, il. 445 pp.	bros. f 4,50	lukse bind. - 8,00
Wodehouse, La Princo kaj Betty (humorista)	-	1,20
Zamenhof, Fundamenta Krestomatio,	broŝ. f 5,50,	bind. - 7,50
Vortaroj, Plena Vortaro de Esperanto	tolbind. -	11,50
Schidlof. uitgebreid Zakwoordenboek	„	- 2,25
Naŭlingva Etimologia Leksikono, L. Bastien	„	- 7,00
Konversacia Vortaro, ŝerca difino de la vortoj	-	0,20
M. E. Biblioteko, 19 n-roj div. temoj, petu prospekton,	po -	0,35
Bildetoj de S. Ignacio de Loyola kaj de N.S. de ĉiuj Popoloj	po -	0,03
Multkoloroj reprod. de Ned. pentristoj, poŝtkartoj, 11 div.	po -	0,08
Esperanto Insignoj	-	1,00

Tiuj ĉi kaj multaj aliaj titoloj, lernolibroj, esperantaĵoj ktp estas ĉe ni haveblaj.

Mendoj kaj Pagoj: por Nederlando al f-ino T. Durenkamp, Dordrecht, p.k. 214009. Por aliaj landoj al la landaj perantoj aŭ al la kasisto de I.K.U.E. en Vleuten, Nederlando, al kiu vi sendu pagateston por plirapidigi la alsendon de la libroj.